



lingvoj en
afriko

ESPERANTO

JULIO/AŬG. 1963

56 a Jaro - N-ro 692-3 (7-8)

esperanto

REVUO INTERNACIA

JULIO-AŬG. 1963

5 6 a J A R O

N-RO 692-3 (7-8)

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion por redakto oni sendu al la Centra Oficejo.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1963): 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

Hodiaŭ la francan; ĉu morgaŭ Esperanton ?
(p. 122-23)

Enhavo

Alvoko (Malmgren)	121
Lingvoj en Afriko	122
"Angoroj" (Albault)	124
Organizo de Esperanto-Ekspozicio (Joliet)	126
Tabela trarigardo pri la informa la- boro en 1962	128
Rimarkoj pri la informado dum la jaro 1962	129

Rubrikoj

CED	130
Novaj libroj	131
Ricevitaj eldonaĵoj	133
Laŭfake	134
Tra la Mondo	134
19-a TEJO-Kongreso, Vraca	135
La Juna Vivo	135
Forumo	136
Radio	136
Ŝaka Rubriko	137
Memoriga Kalendaro	137
Oficiala Informilo	138
Lastmomente	139

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

ALVOKO

speciale direktita al la instruistoj

El interna sed ankaŭ el propaganda vidpunktoj niaj universalaj kongresoj havas grandan signifon. Estis kaj ankoraŭ estas necese, ke la esperanto-parolantoj renkontiĝu, por ke ili povu en interna rondo trakti siajn proprajn problemojn. Tiamaniere la movado plifortiĝas kaj solidiĝas.

Dum multaj jaroj mi vivtenis la esperon, ke al niaj kongresoj venu ankaŭ reprezentantoj kaj observantoj de registaroj kaj de gravaj internaciaj organizaĵoj por sperti kaj konvinkiĝi pri la uzebleco de Esperanto. Sed ĉar tio okazis nur escepte, ni evidente devos praktiki alian metodon: nome ke *ni esperantistoj* ĉeestu la neesperantistajn kongresojn por tie atesti pri la avantaĝoj de nia lingvo.

En la mondo ja nuntempe estas tiom da esperantistoj, ke ni facile povus plenigi plurajn mondkongresojn. Kaj kelkaj profesioj estas multnombro reprezentataj: ekz. en niaj universalaj kongresoj ĉeestas ĉiujare 200-400 geinstruistoj. Alia granda grupo estas la fervojistoj. Kial tiuj grandaj kaj gravaj grupoj ne utiligas sian potencon en siaj ĝeneralaj fakorganizaĵoj? Tamen certe almenaŭ kelkaj el la Esperanto-instruistoj, resp. -fervojistoj, ne multe plendus, se ili forestus de la Esperanto-kongreso por anstataŭe ĉeesti la kongreson de la propra faka organizaĵo.

Por ke vi bone komprenu mian sugeston, mi rakontos al vi epizodon, kiu okazis antaŭ ne longe en geinstruista kongreso:

En la somero 1962 okazis en Stockholm la mondkongreso de la instruista mondorganizaĵo, WCOTP, kun ĝiaj sekcioj IFTA, PIPESO, ICET kaj ICHPER. En la kunvenoj de IFTA ĉeestis 2 esperantistoj, En PIPESO unu esperantistino kaj same en ICET.

En PIPESO kaj en ICET informado pri Esperanto estis ebla nur pere de informfolioj. Sed en IFTA la du ĉeestantaj esperantistoj kaptis la okazon pli detale pledi por la lingvo, aparte ĉar la programo enhavis la problemon pri fremdlingva instruado en la elementaj lernejoj. Ekestis diskuto pri Esperanto, kiam cetere ebligis korekti erarajn opiniojn kaj misprezentojn pri la lingvo. Kaj la kongreso eĉ montris tian intereson, ke oni decidis komisi al la ĝenerala sekretario fari enketon ĉe la membrolandoj pri la Esperanto-instruado en la koncernaj landoj. Krome multaj kongresanoj *inter la diversaj*

programeroj havis eblecon aŭskulti la fluan interparolon inter la du esperantistoj, unu franco kaj unu svedo, kaj krome kelkfoje ĝui la favoron de ilia reciproka interpretado.

Bonvolu atenti: Se tiuj du esperantistoj povis atingi tian atenton kaj tian favoran atenton por la Internacia Lingvo, kian intereson vekus ekz. 20 esperanto-parolantaj kongresanoj aŭ observantoj! Mi asertas al vi, ke tiu grupo verŝajne estus la plej forta homogena grupo de la tuta kongreso.


Sekve mi forte apelacias al vi, instruistoj-kolegoj, ke vi ek de nun prenu pli aktivan parton en via loka faka sekcio, kie vi penu fariĝi influhava persono. Kaj fine ke vi studu la eblecon dediĉi almenaŭ ĉiun duan jaron al partopreno en la tutmonda instruista kongreso. — La venonta mondkongreso de WCOTP okazos en aŭgusto, en Rio de Janeiro, Brazilo. Por eŭropanoj la ĉeesto estos malfacila, sed mi petas ĉiujn sudamerikajn geinstruistojn laŭ la ebleco ĉeesti tiun kongreson. Petu informon ĉe via propra instruista asocio!

Mi faras tiun ĉi apelacion, ke vi partoprenu la instruistajn kongresojn, aparte ĉar mi scias, ke inter vi troviĝas multaj, kiuj havas grandan pedagogian intereson kaj eĉ grandan pedagogan talenton aŭ kiuj komencis provinstruadon laŭ nova metodo aŭ laŭ novaj principoj. Estas en la intereso *kaj* de la ĝenerala eduka evoluo *kaj* de la Internacia Lingvo, ke tiuj instruistoj-kolegoj partoprenu la kunvenojn de la instruistaj asocioj.

La ĉeesto de multnombra grupo de esperantistoj en la instruista kongreso donus al la tuta kongresanaro tian demonstracion pri la praktika valoro de Esperanto, ke ĝi havos pli grandan efikon ol 100.000 da informfolioj, kaj cetere ke la demonstracio influos la publikon tiel, ke ni pli rapide alproksimiĝos al la momento, kiam la ĉefaj kaj plej potencaj pledantoj por la Internacia Lingvo estos ne la specialaj Esperanto-asocioj, sed la profesiaj fakaj organizaĵoj kun milionoj da membroj.

Instruisto-kolego, ne pensu ke mia admono koncernas *nur ĝenerale* la instruistojn. Mi turnas min ĝuste al *vi*! Ĉar ĉio dependas de *vi*. Eble vi estos la persono, aŭ unu el la personoj, de kiuj dependos la estonteco de la internacia lingvo.

E. Malmgren



Studentoj en Monrovia, Liberio (foto UNESKO)

El ĉiuj kontinentoj de la mondo, plej rapide ŝanĝiĝas Afriko. Kvankam ĝi ne havas tian loĝantaron, kian havas Azio, ĝiaj problemoj politikaj, ekonomiaj, edukaj kaj — lingvaj estas senprecedence urgaj. Tion klare substrekis la ĵus okazinta Tutafrika Konferenco en Adis-abebo. Ĉi tie ni prezentas mallongajn raportojn de tri Esperantistoj, kiuj lastatempe vizitis diversajn landojn de Afriko. S-ino P. Potin estas francino vizitinta Senegalion (Okc. Afriko), kie ŝi larĝe informis pri la Internacia Lingvo. S-ro Mark Starr estas konata brita-usona Esperantisto, kiu vizitis orientan Afrikon kiel konsilisto pri sindikata organizo. S-ro Wim de Smet, zoologo, raportas pri centra kaj suda Afriko.

LINGVOJ EN AFRIKO

Opinioj kaj spertoj

LINGVAJ PROBLEMOJ

La 26an de Marto malfermiĝis en Dakaro (Senegalia) kolokvo pri la enkonduko de la franclingva afrika literaturo en la programojn de la Universitatoj. Tiu kolokvo estis organizita de la Kongreso de la Universitatoj el Okcidenta Afriko, kiu sidis en Freetown en Decembro 1961.

En sia malferma parolado Prezidento Senghor, la Senegalia Ŝtatestro, reliefigis la valorojn de la "négritude" (nigra raso) kies "sukoj" nutris la franclingve verkitan literaturon de la nigra popolo.

"Oni riproĉis al ni la elekton de la franca lingvo por esprimi la sentojn de l'Afrikaj nigroloj. Mi respondas, ke ne temis por ni pri elekto, kvankam ni eble estus elektintaj la francan, ne pro sentimentaleco sed kaŭze de racia decido. Sed mi ripetas, ke ne temis pri elekto.

Nia situacio de koloniitoj trudis al ni la lingvon de la Kolonianto. Kiel diris Jean Paul Sartre: ni elektis la armilojn de la Kolonianto por resendi kontraŭ lin".

Ekstrakto de la enkonduko de S-ro Nardin, Dekano de la Fakultato pri Beletroj kaj Homaj Sciencoj.

....Mi komprenas la viglan deziron de ĉiuj, kiuj volas diskonigi la beletrajn verkojn de Afrikanoj. Sed mi memoras la pripensojn de unu el niaj kolegoj, infano de Senegalia, kiu asertis, ke nur pere de Afrika lingvo povos plivastiĝi la tradicia kulturo; ke nur tiu lingvo, kiu ajn ĝi estos inter la diverseco de komunikiloj en tiu ĉi kontinento, povos riveli la Afrikan animon kaj la proprecojn de la nigra stilo."

...."Mi ne samopinias kiel li. Tie-ĉi ne estas loko por diskuti pri tio. Mi nur volis substreki, per diskreta aludo problemon incitante kiel juko, kaj kiu senĉese ekaperas."

Persona vidpunkto de S-ro Fall, Profesoro en la Liceo de Kaolak.

"Kvankam la "nigra" poezio esprimita de franclingvo fontas el la nigra animo, tamen estas poezio de franca esprimo. Do, oni povas dubi ĉu tia poezio montras fidelan spegulaĵon de la aŭtentika nigra animo, tiel kiel ĝi elverŝiĝas kun sia tuta pureco, sia freŝeco, sia spontaneco, en la buŝan literaturon negrafrikan, aŭ kreolan en la Antilaj Insuloj. Alidirite, kiel solvi tiun antinomion, kiu konsistas, ĉe la nigra poeto, el nigra sento esprimita per franclingvo?"

Raportis: P. Potin

LETERO EL UGANDO

Ĵus mi revenis de Radio Uganda, kie mi informiĝis, ke en tiu stacio oni devas uzi 14 lingvojn! La stabo devas enhavi almenaŭ po unu homo, kiu povas paroli kaj kompreni ĉiun el la ĉi tie uzataj lingvoj. Tiel daŭras la kondamno de Babelo en tiu ĉi lando de 6½ milionoj da enloĝantoj. La ventoj de ŝanĝado en Afriko ĝis nun ne forblovis la barilojn kaj limojn de lingva diverseco. Male, kun la ekfloro de novaj nacioj kaj triboj, la lingvaj bariloj plimultiĝas. En Afriko estas 200.000.000 loĝantoj, kaj 200 diversaj lingvoj.

Entute mi estis nur dum 12 monatoj en Tanganjiko, Zanzibaro kaj Ugando, kaj mi plej bone konas la landon unue nomitan. Kiel kutime oni informis min: "Ĉiu parolas angle". Sed la

nova nacio fakte nun komencas uzi la ŝahilian lingvon oficiale en la parlamento. La angla lingvo estas rigardata kiel lingvo de koloniistoj-imperialistoj. Sub-ministro Rowland Mwanjisi (laŭ ĵurnaloj de 20.2.63) deklaris, ke la angla estas lingvo de kapitalistoj, la ŝahilia de socialistoj.

Mi funkciis kiel "spertulo" en laborist-edukado, kaj mi devas instrui anojn kaj estrojn de la laborist-sindikatoj; ĉiam necesas interpretisto. Mi devis aĉeti lernolibrojn, ĉar mi ne volas ĉiam komenci prelegi kaj instrui per la frazo: *Mimi nasikitika kuwa situweza kusema kiswahili. Najaribu!*" (Mi bedaŭras, ke mi ne povas paroli ŝahilie. Mi penas lerni!) Ofte mia interpretisto ne sufiĉe komprenas angle, kaj bedaŭrinde ne scipovas Esperanton. Kiam mi atingis la insulojn Zanzibaro kaj Pemba, denove necesis broŝuroj kaj lecionoj ŝahiliaj. La ŝahilian lingvon uzas laŭ iuj taksoj 30.000.000 homoj en orienta Afriko, laŭ aliaj nur 8.000.000. En Ugando estas rivalaj reĝlandoj kaj distriktoj, kaj la reĝo de Bugando (la plej riĉa kaj evoluinta) insistas, ke la popolo devas uzi la triban lugandan lingvon.

En multaj landoj en Afriko ĝis nun ne ekzistas sufiĉe da lernejoj. Plej multe necesas teknika preparado. En kelkaj distriktoj, kiel en Eŭropo, grupoj eĉ perforte interbatalas pri akcepto de oficiala lingvo. Kelkaj antaŭdiras, ke, kiam la Kontinento unuiĝos, tiam uziĝos la franca kaj angla lingvoj. Aliaj diras, ke por partopreni en la nuntempa mondo, la afrikanoj devas lerni sole la anglan. Mi mem per leteroj aperintaj en *Tanganyika Standard* (2), *Daily Nation* (Kenjo), *Uganda Argus*, kaj per aperonta longa manuskripto en grava revuo *Spearhead* proponis nian lingvon. En miaj kursoj mi disdonis informilojn kaj ofte prirakontis mian proprajn spertojn en multaj landoj. Tre utilis la broŝuro de UEA verkita de Tibor Sekelj: "Komuna Lingvo por Afriko"*. Kun Tibor Sekelj mi prezentis du programojn por Radio Tanganjika.

Kompreneble Afriko tre bezonas la helpon de Esperanto. Sed kion fari? Mi proponas:

1. disvastigi la broŝuron de Sekelj en Afriko (kaj eldoni similan por Azio),
2. por Afriko orienta eldoni folion kaj gramatikon en la ŝahilia lingvo, lingvo de 120 triboj,
3. proponi al ĉiu Ministro de Edukado en ĉiu nova lando, ke li akceptu UEA-delegacion por diskuti la lingvan problemon,
4. prepari liston de kapablaj instruistoj, kiuj estas kompetentaj kaj estus pretaj, starigi kursojn por instruistoj.

Estas multaj obstakloj. Multaj homoj argumentas, ke ni nur aldonas plian lingvon al la

miksaĵo. La poliglotoj kaj lingvo-profesoroj timas perdi sian okupon. Naciismo kaj ŝovismo instinkte timas reciprokan interkomprenon inter homoj tra la tuta mondo. Riĉaj fondaĵoj ĝis nun ĵetis milionojn da dolaroj, kaj registaroj samkvante, por akceli la studadon de sia propra lingvo. La naskiĝanta homaro ne havas dolarojn, sed ĝi havas sopiron por paco kaj supernacia reciproka interkompreno.

Mark Starr

KONGOLANDO KAJ SUDAFRIKO

La spertoj, kiujn mi travivis en Afriko, kondukis min al lernado de Esperanto post mia reveno en Eŭropon. Mi do ne povas priskribi la signifon de Esperanto en la afrikaj landoj, kie mi vivis (Jadotville, Kongolando, 1955-56; Bloemfontein, Sudafriko, 1956-7), sed nur la ĝeneralan lingvan problemon en Afriko. Fakte la problemoj estas tute malsamaj en Kongolando kaj en Sudafriko. Sed ĉie ekzistas la sama trajto, ke instruitaj indiĝenoj troviĝas antaŭ la neceso lerni eŭropajn lingvojn (malfacila afero); en ambaŭ landoj tiutempe po du eŭropaj lingvoj estis oficialaj. La situacio tamen ŝanĝiĝis intertempe. En Kongolando la rolo de la nederlanda (flandra) lingvo preskaŭ malaperis favore al la franca, kaj en Sudafriko la influo de la angla lingvo iom post iom malkreskis favore al la afrikansa.

En ambaŭ landoj la indiĝenaj lingvoj havas nur tre malgrandan influon en la kultura vivo; preskaŭ ĉiuj kulturaj manifestacioj okazas per eŭropaj lingvoj. Tio estas aparte trafa en Sudafriko, kie pro la plurgeneracia ĉeesto de blankuloj, la plejparto de neblankuloj pli malpli scipovas unu aŭ du eŭropajn lingvojn. Sed en la orminejoj de la regiono de Johannesburg prosperas la idiomo Fanagolo, mikspotajo de anglaj, afrikansaj kaj bantuaj vortoj. Ĝi estas evidenta ekzemplo de la vivkapablo de lingvo, kiu kreiĝis el pluraj lingvoj, kaj kiu tamen ne apartenas al iu specifa popolo. La samon oni povas diri pri la idiomo kingŭana, kiun oni uzas en orienta Kongolando; ĝi estas modifo de la ŝahilia kun simpligita gramatiko kaj multaj eŭropaj vortoj. La provoj por fari la lingvojn lingalan kaj ĉiluban la oficialaj lingvoj de Kongolando ne donis kontentigajn rezultojn, kaj oni nuntempe preferas la francan pro ĝia kultura valoro kaj internacia rolo.

Afrikanoj lernas nur tiujn lingvojn, kiujn ili vere bezonas. Do nur kiam Esperanto estos bezonata, ĝi vekos la intereson de la afrikanoj. Estas nun la tempo por krei peresperantajn kontaktojn kaj rilatojn en komerco, scienco, instruado, turismo, politiko, interŝtataj rilatoj ktp.; se multflanke montriĝos la vivo de Esperanto, ankaŭ la interesiĝo ekekestos en Afriko.

Wim de Smet

* Havebla ĉe la C.O. en franca aŭ angla lingvo kontraŭ po 0,15 gld. (0,60 st) por ĉiu ekzemplero.



Jana FLEGO-RAVSELJ
en la rolo de Irena.

Ĉe l'koro de Parizo. Kvina etaĝo: eta ĉambro lumabunda; malsupre vigla trafiko sur la vojkruciĝo; sur la muroj reklamaj bildoj iam tie ĉi kreitaj; sur tabletoj aparatoj kaj plej diversaj iloj kaj iletoj ŝajne senorde; pecoj de filmo dise; filmbobenoj tie ĉi kaj tie for...

En tiu eta ĉambro, dum semajnoj, vespere post la laborhoroj kunvenis kvin-ses homoj. Se vi bone observus ilin, vi vidus etan flamon brili en iliaj okuloj: ili volis krei filmon! Ili jam kreis ĝin! Filmon kun scenaro kaj artistoj: nu, jes! Vi komprenis: veran filmon, sed filmon tian, kiel oni neniam vidis ĝis nun!

Mi ne volas pli longe lasi vin diveni: Filmon Esperanto-parolantan kun konataj artistoj de nia movado: Serge FLEGO, Marc DARNAULT kaj Jana FLEGO-RAVSELJ! ”Angoroj” estos la titolo. Suspens-filmo laŭ la maniero de Hitchcock. Ĝi estos la unua ludfilmo en la internacia lingvo kaj ĝi daŭros iom pli ol unu horon.



— J. L. MAHĖ, ŝajnas al mi, ke ni povas diri, ke vi estas samtempe la aŭtoro, la scenaristo kaj la reĝisoro de ”Angoroj”? — Jes! Vi ĝuste diras, sed se plaĉas al vi multobligoj, vi povas aldoni: la teknikisto-produktisto kaj ankaŭ la distribu-onto! Pli prave dirite, mi devas diri, ke ni formis etan laborgrupon kaj ĉiu el ni helpis laŭbezzone laŭ sia kompetento; mi pensas ekzemple pri nia amiko Jean THIERRY, kiu konstante helpis nin por la teknikaj aranĝoj kaj kiu plie devis surprizi akcesoran rolon...

— De kiam vi preparas tiun filmon? — De la lasta Decembro, sed ni havis ĉiujn ĝenaĵojn eblajn kaj neeblajn. Ekzemple post la unua semajno de laboro, DARNAULT glitis teren kaj rompis ion en unu mano. La sekvantan semajnon, do, li ludis nur la scenojn permesantajn manon en la poŝo ĉar tiu mano devis resti en la gipso por kvar aŭ ses semajnoj... Fakte, tiun semajnon, ni perdis nian tempon. Tio devigis nin transŝanĝi la laborplanon por realigi tute aliajn scenojn sen Darnault: tiuj en la kelo.

— Kaj nun? En kiu stato estas la tuta afero? — Nu! Ĉiuj internaj scenoj estis filmitaj jam antaŭ tri semajnoj; ni ĵus kompletigis per la kelkaj eksteraj scenoj por kiuj ni devis trovi kelkajn pliajn rolantojn. Kaj ĉar ni ne povis kontentige trovi iun blankbarbulon por la maljuna murdito, do, ni solvis la problemon per tio, ke ŝminkita figuranto surprenis tiun rolon. Nun ĉio estas filmita. Restas nur la teknika parto: la tuta muntado de la scenoj en kontinuan filmon preta por la ekranoj. Tio povas postuli de du ĝis kvar aŭ kvin monatoj.

— Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la enhavo de la filmo? — Nu! Mallonge, temas pri triopo, kiu mortigis maljunulon sed elreviĝas ĉar lia biletujo estas malplena, aŭ preskaŭ. Tamen en ĝi ili trovas leteron, kiu lasas ilin esperi pri eta trezoro: tio estas elirpunkto de aventuro, kiun ne eblas detale rakonti, se ni

Intervjuo kun la kreanto de la

Unua "Suspens"-filmo en Esperanto.

volas konservi freŝecon de la temo por la estontaj spektantoj... Mi devas aldoni, ke la sukceso de la filmo grandaparte kuŝis sur la ŝultroj de Jana RAVŜELJ, la novedzino de FLEGO, kiel vi scias. Ni iom timis en la komenco, sed fakte ŝi eminente ludis: ŝi bonege enkorpiĝis en sia rolo, kaj la spektantoj ŝin vidante sur la ekrano ne povos ne infektiĝi de ŝia timo kaj angoroj. Almenaŭ ni tion celis kaj ni tion esperas: la spektantoj juĝos...

— *Se mi estas bone informita, vi jam kreis filmon, kiu estis prezentita en 1937, okaze de la Konferenco pri "Esperanto en Moderna Vivo"?*
— Jes! "Antaŭen!". Tute alia afero... Neniel komparinda.

— *Kaj ĉu vi ne jam verkis?* — Jes! en Franca Esperantisto, en la jaroj 1946-'48 aperis de mi, felietone, iu detektivromano: "Retoj".

— *Iel ŝajne, verko aŭ filmo pri malbonaj burŝoj, pri la medio de la banditoj, allogas vin?*
Ĉu mi timu ŝoki la publikon? Ba! Persone, mi

konstatis, ke kvar el kvin Esperanto-originalaj verkoj, teatraj aŭ aliaj, estas el la roza speceto antaŭdigestita por infanoj... Mi volis verki por plenkreskuloj... Aliflanke, oni atendu kaj traangoru la tutan spektaklon por konkludi ĉu mia fino estos morala aŭ ne; kaj ne eblas paroli pri Kain, ne parolante ankaŭ pri la krimo.

— *Ĉu vi opinias, ke "Angoroj" povos aperi sur la ekranoj ĝis fino de la jaro?* — Jes! Tion mi esperas, kvankam mi ne povas jam nun profeti precizan daton. Mi intencas pretigi dekon da kopioj; ili estos kiel la originalo 16-milimetraj...


— *Koloraj?* ... — Ne. Tio necesigus multe pli da laboro kaj multe pli da kapitalo. Cetere en la konkreta kazo, koloro aldonus nenion utilan.

— *Dankante vin pro viaj valoraj informoj, mi volas vin gratuli por via kuraĝa pionirado en branĉo preskaŭ virga por nia movado.* Mi volas esperi ke multaj esperantistoj aplaŭdos vian entreprenon kaj ke sufiĉe multaj landaj asocioj tra la mondo deziros mem posedi la filmon por ĝin cirkuligi en sia lando, kaj tiel kuraĝigos vin sur tiu nova vojo. Laŭ la scenaro, kiun vi pruntis al mi por legi, kaj laŭ la kelkaj filmitaj scenoj, kiujn vi montris, la filmo, laŭ mi, certe meritas sukceson. Restas nur unu nekonato: ĉu nia movado estas matura por akcepti la Sepan Arton? Fakte, vi estas la kuraĝulo, kiu ĵetis defion al nia movado!

Andreo Albault



Serge FLEGO kaj
Marc DARNAULT
en la roloj de Karleto
kaj Henriko.



Leo Joliet

Organizo de

5-a Universala Ekspozicio
de Esperanto, Varsovio

Nenio povas montri la neceson, taŭgecon kaj disvastigon de la Internacia Lingvo pli bone ol ĝuste aranĝita ekspozicio. Ĝi kondukas la interesitojn meze en la internacian vivon, en la praktikan aplikadon de la lingvo kaj eventuale devigas eĉ skeptikulojn vole-nevole al la konfeso, ke Esperanto evidente ludas jam pli grandan rolon ol ili ĝis nun supozis. Kaj ĉar la nuntempa publiko emas prijuĝi aferojn laŭ ilia praktika valoro, la vizitanto, vidante la jamajn eblojn de la praktika aplikado de Esperanto, eble konvinkiĝas, ke povas esti ne malutile, eluzi ĉi tiujn profitdonajn ŝancojn. Sed rezultojn oni povas atingi nur per vere impresa ekspozicio kun konvinka materialo. Ne ĉiuj ekspozicioj konformas al ĉi tiu postulo. Kelkfoje ili estas aranĝitaj eĉ tiamaniere, ke ili donas al la vizitanto la impreson, ke temas pri neresioza afero. Pro tio estas grave, ke la aranĝantoj de ekspozicio atentu la jam faritajn spertojn. Kaj tio nur estas ebla, se ĉiu ekspoziciaranĝanto sciigas siajn spertojn al centra instanco, en nia kazo al UEA, por ke ili estu utiligataj en la estonta tempo.

La preparoj de ekspozicio estas la plej grava kaj ampleksa parto de la laboroj. Ju pli detale ĉiu afero estas antaŭe pripensita, des pli facilaj estas la postaj farenadoj.

La unua klopodo de ekspoziciaranĝanto devas esti la eltrovo de taŭgaj kunlaborantoj. Ili estas necesaj, por povi pridiskuti la estiĝantajn problemojn. Ne estas grave, ke la helpantoj estu esperantistoj. Pli utile estas, ke ili estu spertaj en ekspoziciaj aferoj.

La dua paŝo devas esti la trovo de konvena ejo. Ĝiaj ecoj, precipe ĝia grandeco, la situo de la salonoj, ilia meblaro ktp. destinas la amplekson de la ekspozicio kaj la instalmanieron de la objektoj. Ĉar pleje ekspozicioj estas aranĝataj en kunligo kun kongresoj aŭ similaj okazaĵoj, kiuj altiras homojn, kaŭzantajn financajn profitojn al la urbo, estas rekomendinde, interesi la urbestron pri la projekto. Li aŭ almenaŭ lia kompetentulo pri ekspoziciaj aferoj estas la plej bona subtenanto en la trovado de taŭga ekspoziciejo. Ili plej bone konas la lokajn cirkonstancojn kaj iliaj deziroj estas pli respektataj ol tiuj de la ekspoziciaranĝanto. Se la urbestro havas sufiĉe da intereso pri Esperanto, li eble disponigos urban ejon senkoste aŭ mone subvencios la aranĝon de la ekspozicio. Oni almenaŭ provu atingi tion.

Kompreneble ekspozicio devas esti ĉiurilate serioza, inda al la reputacio de la movado. Jam la ejo, kiun oni elektas, devas konformi al ĉi tiu postulo. Laŭ la ebloj oni elektu muzeon, (alt) lernejon aŭ similan konstruaĵon.

Pri la demando, ĉu enkasigi enirpagon, aŭ ne, la

opinioj diferencas. Laŭ la spertoj multaj homoj ne estimas tion, kio kostas neniom. Pro tio ne estas malĝuste enkasigi iom. Oni ja povas fiksi ne tro altan pagon, kaj estas rekomendinde, nomi ĝin "kontribuaĵo al la kostoj". Al lernantoj, studentoj, pensiuloj ktp. oni konsentu konsiderindan rabaton. Okaze de vizito de lernejoj oni prefere rezignu. La gajno de la junularo ja estas nia plej granda aspiro.

La allogo de neesperantistaj vizitantoj estas malfacila kaj unu el la plej gravaj taskoj, ĉar de kontentiga vizito dependas la ĉiurilate sukceso. Por atingi bonan viziton, oni faru ĉion eblan kaj eĉ ne timu elspezojn. Oni povas varbi per anoncoj en gazetoj, per afiŝoj pendigitaj publike, en magazenoj, vendejoj, restoracioj, oficejoj ktp., per invitleteroj al lernejoj, fervojaj kaj poŝtaj oficejoj, unuigoj kun internacia sinteno, kies membroj supozeble pleje komprenas niajn celojn, sindikatoj, administracioj. Ankaŭ la disdonado de varbfolioj sur la stratoj estas ebla, sed por ĝi oni ofte bezonas specialan permeson. La preterpasantojn oni allogu per laŭeble plej granda afiŝo super la enirpordo kaj sufiĉe granda flago.

Estas nepre necese, ke en la ekspozicio konstante ĉeestu ĉiurilate spertaj kaj lertaj esperantistoj, kiuj povas trafe kaj konvinke respondi ĉiujn demandojn, refuti kontraŭdirojn kaj skeptikajn argumentojn. Oni disponigu sufiĉe grandan stokon da informiloj, lernolibroj, vortaroj. Ilia vendo kontribuas al la enspezoj. Oni krome ne forgesu liston, per kiu interesitoj povas anonci sin por partopreno al baldaŭ komenciĝonta kurso kaj liston por vizitantoj, kiuj deziras plian varbmateriaron. Oni varbu la vizitantojn ankaŭ por aliĝo al la loka grupo kiel subtenantaj membroj.

La materialo de nedaŭra ekspozicio neniel povas esti kompleta. Necesas nur, montri la plej gravajn objektojn kaj ĉi tiuj devas esti en nepre bona stato. Malbone aspektantaj ekspoziciaĵoj provokas pravajn kritikojn kaj eventuale endanĝerigas la cetere bonajn impresojn. Valorajn objektojn oni protektu kontraŭ perdo per ekspozo en vitrinoj aŭ ŝrankoj kun vitraj pordoj. Se ili ne estas disponeblaj, oni povas kovri la objektojn, elmetitajn sur tabloj, per travidebla kovraĵo, kiu estas fiksita per najletoj ktp. Al vere interesiganta vizitanto la deĵoranta esperantisto povas montri enslositan objekton sub kontrolo. La materialo estu elektita tiamaniere, ke ĝi prezentu al ĉiu, tiel al serioza klerulo kiel al infano poŝtmarkkolektanta la interesan kaj impresan koncernaĵon.

En la centro de la ekspozicio estu bela, — nepre nur tia —, portreto de Zamenhof. Se taŭga bildo ne ekzistas, oni prefere rezignu pri elmontri. Sub la portreto estu teksto kun la plej gravaj datoj: "Doktoro L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, naskita en 1859 en Bjelostoko, mortinta en 1917 en Varsovio". Tio sufiĉas. Super la portreto pendu Esperantoflago, konforma al la grandeco de la portreto. Eventuale oni povas anstataŭigi ĝin per 2 pli malgrandaj flagoj ĉe ambaŭ flankoj de la portreto.

Antaŭ kaj flanke de la portreto grupigu la verkojn de Zamenhof (inkluzive la "Leteroj", la "Originala Verkaro" kaj la "Lingvaj Respondoj", krome la bio-

Esperanto-Ekspozicio

1-a Universala Ekspozicio
de Esperanto, Montevideo



grafioj pri li (de profesoro Privat, de Marjorie Boulton ktp.). Se fotografaĵoj de Zamenhof, liaj familianoj ktp. estas disponeblaj oni donu al ili en la apudeco konvenan kaj indan lokon.

La ekspozicia materialo konsistas plejgrandparte el libroj. Ilia nombro estas tiel ampleksa, ke ne povas estiĝi embaraso en la elekto. Kompreneble la libroj devas esti bonaspektaj. Ili povas esti ordigitaj laŭ sia enhavo.

1e) Scienca literaturo.

Verkoj kiel "Sciencaj Studoj", redaktita de Neergaard, "Retoriko", "Aktualaj Problemoj" kaj "La Internacia Lingvo" de Lapenna, "Eseoj" kaj "Lingvo kaj Vivo" de Waringhien, — por citi nur kelkajn —, ne manku.

2e) Lernolibroj kaj ŝlosiloj.

3e) Vortaroj, fakaj vortaroj kaj terminaroj.

4e) Originala literaturo.

5e) Traduka literaturo.

Al ĝi apartenas antaŭ ĉio la ĝis nun aperintaj Antologioj, la Biblio ktp.

6e) Gazetoj kaj revuoj.

Ili devas esti plaĉe ordigitaj sur murtabulo. Pleje ili mirigas la rigardantojn pro sia granda nombro.

7e) Prospektoj.

Da ili ekzistas multaj centoj. Plaĉe ordigitaj sur murtabulo, ili altiras pro sia multkolora aspekto la rigardojn de la vizitantoj. Speciale efikaj estas la belegaj varbiloj de preskaŭ ĉiuj flugentreprenoj (KLM, SAS ktp.) kaj la same belaspektaj prospektoj de la Germana Fervoja Administracio.

8e) Esperantaj poŝtmarkoj.

9e) Bildkartoj.

En la 4a Universala Esperanto-Ekspozicio en Majenco povis esti montrata en speciala vitrino unika kolekto de bildkartoj kaj kovertoj el proksimume 100 landoj. Ilin kolektis kaj disponigis S-ro Otto Böhm, Danziger Str. 8, Karlsruhe-Rüppurr, Germana Federacia Respubliko. La kolekto estas tre efika pruvilo pri la mondskala disvastiĝo de Esperanto kaj ĝi altiris la atenton de multaj vizitantoj, precipe gejunuloj.

Al la plej bonaj propagandiloj apartenas la fervojaj horaroj kun klarigaj tekstoj ankaŭ en Esperanto, de kiuj jam sufiĉe multajn eldonis diversaj fervojaj administracioj.

Tre efikaj estas ankaŭ la informbroŝuroj "Faktoj pri Germanujo", eldonitaj en Esperanto flanke de la Germana Federacia Respubliko. Samrangaj estas la "Faktoj pri Ĉeĥoslovakio, pri Danlando, pri Islando", la "Gvidlibro Praha", "Bulgario", eldonitaj de gravaj entreprenoj.

Nepre ne manku la Jarlibro de UEA, la plej taŭga propagandilo de la movado.

Estas rekomendinde, informi la vizitantojn de la ekspozicio ankaŭ pri la gravaj sukcesoj el la lasta tempo kaj pri organizaj demandoj. Por tio tre bone taŭgas kartonaj tabul(et)oj, sur kiuj estas skribitaj per preslitteroj la necesaj indikoj. Temas i.a. pri jenaj aferoj:

1e) La Petskribo (Deklaracio), transdonita la 2.8.50 al la Unuiĝintaj Nacioj,

2e) la Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo, 1954,

3e) Strukturo de UEA, ĝiaj suborganizaĵoj kaj la Fakaj Asocioj,

4e) la Universala Ligo kaj ĝiaj celadoj,

5e) la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien,

6e) la esperantlingvaj radioelsendoj,

7e) la stratoj kaj placoj kun la nomoj de Zamenhof kaj Esperanto,

8e) la delegitara reto,

9e) eldiroj de eminentuloj pri Esperanto.

Ne nur vere belaj murornamaĵoj sed krome bonegaj propagandiloj estas la UNESKO-afiŝoj, haveblaj de UEA. Ili ĉiam multe impresas.

Pro la konsiderinda amaso da ekspozindaj objektoj estis citeblaj nur la plej elstaraj. Oni devas lasi al la bontrovo de la ekspoziciaranĝanto la decidon pri la amplekso de la elmontraĵoj. Tio dependas de la lokaj cirkonstancoj kaj de la disponebla mono. La aranĝo de ekspozicio estas bela tasko, kvankam ligita al multe da laboro. Sed la konscio, esti farinta al la Esperantomovado grandan servon kaj al la progreso de nia afero rimarkindan kontribuojn kompensas ĉiujn penojn.



Noto de la Centra Oficejo. Por ekspoziciaj celoj la C.O. povas liveri dekon da diversaj turismaj prospektoj en Esperanto kontraŭ 0,60 gld. (2 rpk), inkluzive afrankon.

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1962

Landa Asocio aŭ teritorio (Informa Fako)	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	Numero de		Prelegoj		Radio prelegoj	Ekspozicioj		Distrib. afiŝoj folioj broŝuroj	Ĉu la inte- resiĝo pri Esperanto kreskis ?
		artikoloj	informoj	nombro	ĉeestintoj		nombro	ĉeestintoj		
Aŭstralia	Diversaj raportintoj	68	55	10	550	5	5	3567	206	Kreskas
Aŭstria	Gaz. Servo de AEF, Fünfhaus- gasse 16, Wien XV	150	300	20	600	52	1	200	10000	Kresketis
Belga (IF)	Ned.: G. Maertens, Prins Leo- poldstr. 51, St. Kruis, Bruĝo Franca: Grafo de Cuyper, 66, rue de Dorlodot, Monceau-sur- Sambre	14	26	6	200	2	2	150	425	Iomete kreskis
Brazila (IF)	Prof. C. Domingues, Rua Al- varo Alvim 27-ap. 61, Rio de Janeiro	1150	5000	200	15000	300	25	60000	24100	Sama
Brita	BEA, 140 Holland Pk Ave. London W. 11	30	400	50	2000	4	4	2500	15000	Kreskis
Bulgara (IF)	K. Karucin, Bul. Ĥristo Botev 102, Sofio	55	36	64	9800	15	37	8400	9300	Kreskis
Ĉeĥoslovaka	Ĉ.E.K., Praha 2, Blanicka 4.	9	43	15	1600	17	8	10000	7400	Iom kreskis
Cejlona	D-ro V. Sadler	2	11	12	1000	3	—	—	200	Kreskis
Dana (IF)	O. Schröder, Ved Sønderport 19, København S.	79	433	—	—	4	—	—	7600	Verŝajne kreskis
Franca (IF)	UFE, 34 rue de Chabrol, Paris X	616	784	157	8180	68	26	19095	63287	Iom kreskis
Germana (IF)	B. Zenker, 645 Hanau, Ram- saystr. 15	811	342	42	1693	25	37	9342	172000	Iomete kreskis
Helena	Helena Esp. Asocio	2	7	—	—	—	—	—	—	Sama
Hispana (IF)	S. Aragay, arce 8-2-4a, Cornel- la (Barcelona)	120	85	19	1500	25	5	2200	13800	Tre kreskis
Hungara (IF)	Inf. Komisiono de HEA, Bu- dapest 4, Pf. 147	33	225	50	4000	20	28	4500	9000	Konstanta kresko
Islanda (IF)	B. Ragnarsson, Alfhólsvegur 42, Kópavogur	2	30	0	—	1	0	—	0	Iomete kreskis
Israela	Esp. Ligo en Israelo	9	25	4	120	3	3	250	530	Iom kreskis
Itala (IF)	R. Pennazio, C. p. 248, Torino	314	750	63	3750	57	13	30600	36353	Sama
Japana	Japana Esp.-Instituto	45	25	15	1000	2	50	20000	3000	Kreskis
Jugoslavia (IF)	Mirković D., JEL, Terazije 42, Beograd	42	217	19	?	34	26	20000	3500	Stagnis
Kanada	W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto 7, Ont.	23	29	12	750	14	3	?	5182	Multe kreskis
Madagaskara	H. Rousseau, B. P. 730, Tana- narive	3	—	1	150	6	1	300	800	Kreskis
Meksika (IF)	S-ino A. Zepeda, Altamirano 75-1, Mexico 4, D.F.	6	4	12	1200	1	1	4000	—	?
Monaka	J. Derks, 8 Bd. d'Italie, Monte Carlo	25	—	1	15	0	—	—	—	Kreskis
Nederlanda (IF)	J. C. Hinrichs, van Linseho- tenstr. 44, Hoogesand	86	133	5	150	1	4	1000	6000	Sama
Norvega (IF)	L. Anjer, Boks 942, Oslo	20	558	6	290	1	—	—	50000	Sama
Novzelanda (IF)	S-ino B. M. Harvey, 21 Stoke St., Wellington S. I	7	231	10	500	1	3	4200	5500	Kreskis
Pola (IF)	K. Miezin, Warszawa 50, ul. Darłowska 5 A m 7	50	950	300	10000	226	6	10000	10400	Decide kreskis
Soveta	M. Urban, Moskvo	300	—	400	14000	4	50	?	—	Ĉiam kreskas
Sveda (IF)	J. Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö	345	750	227	15800	3	5	156000	6700	Sama
Svisa (IF)	D-ro A. Baur, Hangweg 57, Liebefeld BE	60	90	5	?	3	4	?	5500	Stagnas
Urugvaja (IF)	R. A. Barbieri, Rio Branco 1556, ap. 601, Montevideo	8	40	3	—	50	1	100	1360	sama
Usona (IF)	D-ro T. A. Goldman, 7008 Mill- wood Rd, Washington 14, D.C.	3	5	25	500	3	7	26000	1471	Kreskis
Venezuela	V.E.A., Apt. del Este 4845, Ca- racas	10	1	—	—	—	—	—	100	Kreskas
33 respondoj		4497	11595	1753	94348	949	355	392404	468660	Kreskis
28 respondoj	Ciferoj por 1961	4476	9902	1124	71630	791	259	339250	448190	Kreskis
30 respondoj	Ciferoj por 1960	4301	9269	1361	93980	669	288	421550	313050	Kreskis

La Tabelan Trarigardon pri la Informa Laboro farita tra la mondo dum la jaro 1962 la Informa Fakto de UEA ellaboris surbaze de la informoj, kiujn la landaj asocioj, la landaj informaj faktoj aŭ rektaj kunlaborantoj sendis responde al la regula ĉiujara enketo. Ĝi suferas je la tradiciaj malsanoj: certagradaj nekompleteco kaj neprecizeco. Unue oni devas noti, ke malgraŭ pluraj memorigaj cirkuleroj kaj leteroj kaj daŭraj prokrastoj de la pretigo de la statistiko neniujn respondojn sendis la aliĝintaj asocioj Finnlando kaj Urugvajo* (dum Argentino klarigis, kial ĝi ne informas) kaj la nealiĝintaj Hindujo, Libano, Rumanujo kaj Suda Afriko (dum Indonezio klarigis). Due, dum en kelkaj landoj, precipe en Germanujo, Italujo, Pollando kaj Francujo ekzistas perfekte organizitaj informaj aparatoj, kiuj disponas pri rimedoj por kontroli ekzemple sian laborefikon koncerne la gazetaran servon kaj faris propran nacian enketon ĉe siaj lokaj societoj kaj kunlaborantoj, en aliaj landoj tute aŭ parte mankas tiu elementa organiziteco. Tial en unuj kazoj la ciferoj donitaj estas precizaj kaj ĝis maksimumo kompletaj, dum en aliaj temas pri tutcerte tro malaltaj ciferoj Kredi, ekzemple, ke en Usono aperis nur la entabeligitaj 8 artikoloj kaj informoj, estus evidenta naivaĵo. Kelkfoje, hazarde, estis eble por la I.F. de UEA korekti la ciferojn surbaze de ricevitaj informoj; ekzemple la dana asocio ne informiĝis pri la 4 radiaj kaj televida elsendoj pri la Universala Kongreso kaj Esperanto en la Lernejoj.

El la tabelo mem sekvas, kiuj landaj asocioj funkciigis verajn informajn faktojn. Kvankam certe la evoluo ne rapidegas sur tiu ĉi kampo, tamen estu konstatite, ke temas ĉijare pri 20 kompare kun 17 antaŭ unu jaro, se oni kalkulas nur tiujn, kiuj respondante pruvis sian ekzistadon. Tamen, en la gazetaro estas multaj signoj, ke la landaj asocioj, ellaborante siajn laborplanojn laŭ la instigo de la Dua Baza Laborplano de UEA, dediĉas sian atenton ankaŭ al tiu ĉi kampo. En Soveta Unio kaj Argentino la afero estas aranĝata.

Klarigo de la rubrikoj

La statistiko inkluzivas ĉiujn artikolojn kaj informojn aperintajn en la nacilingvaj gazetaroj pri la Internacia Lingvo aŭ pri D-ro Zamenhof dum 1962. Ankaŭ la malfavoraj artikoloj kaj informoj estas enkalkulitaj, sed ilia nombro estas, kiel ĉiujare, tute sensignifa. La plej altan nombron ili atingis en Germanujo (51 el 1.153, do 4.4%). En Nederlando, el 219 artikoloj kaj informoj 16 estis malfavoraj, kaj en la aliaj landoj temis pri po maksimume 9 malfavoraj artikoloj. Entute, el 16.034 artikoloj kaj informoj de la tuta statistiko, nur 108, do 0.7%, estis malfavoraj!

La prelegoj ĝenerale, same kiel tiuj en radio kaj televido, estas nur nacilingvaj. Sekve ne estas enkalkulitaj la 1.677 radiosendoj en la Internacia Lingvo, kiujn nombris CED.

Nur la publikaj ekspozicioj estas inkluzivitaj.

Kompreneble, tute speciale rilate la nombrojn de personoj, kiuj ĉeestis la prelegojn aŭ ekspoziciojn, la ciferoj donitaj estas proksimumaj.

Fine, la rubriko "Afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj" inkluzivas krom la diversaj eldonaĵoj de la landaj asocioj la presaĵojn de UEA mem (seslingva flugfolio, flugfolio por universitataj medioj, la broŝuro por Afriko, la nova afiŝo de UEA).

*) La respondo de la urugvaja I.F. alvenis post la verko de tiu ĉi artikolo (31.5.63), sed la ciferoj estas metitaj en la statistika trarigardon.

Kvankam la statistika teorio admonas nin fari nur tre singardajn konkludojn surbaze de la aktuala materialo kun ties menciitaj malsanoj, tamen komparo kun la rezultoj de la antaŭa jaro evidentigas, ke ĝenerale estis farita plia paŝeto antaŭen en la pasinta jaro.

Ankaŭ kompare kun la antaŭaj dek jaroj la rezultoj de 1962 estas tute kontentigaj. Efektive nur en la jaroj de la tre intensaj kampanjoj estis atingitaj iom pli bonaj sukcesoj.

Specialaj Informaj Aktivecoj

Aldone al la aktivado, kiu montriĝas el la tabelo, en la diversaj landoj oni utiligis la cirkonstancojn, internajn kaj eksterajn, por apliki ankaŭ aliajn metodojn de informado. En Aŭstralio, Belgujo, Jugoslavio, Britujo, Usono, Francujo kaj Cejlono oni diversmaniere reklamis per anoncoj; en Aŭstralio, Germanujo kaj Britujo speciale oni aplikis *montrofenestrojn* aŭ *afiŝojn* ĉirkaŭ la stacidomoj. Ĝenerale oni povas konстати, ke ĝis tro malalta grado oni ŝajne utiligas la bonajn eblojn rilate speciale afiŝojn, kiel montras ankaŭ la ĝisnuna disvendado de la antaŭ nelonge eldonita afiŝo de UEA. Kolorajn *diapozitivojn* uzis Aŭstrujo, dum en Jugoslavio kaj Belgujo oni reklame montradis tiajn en *kinejoj*. En Italujo estis montrataj *filmoj* kun Esperanto-sono en la lernejoj. *Sonbendojn* prezentis la kunlaborantoj en Germanujo, kiuj ankaŭ disdonis bonegajn *varbfoliojn* kaj *-kartojn* en multaj urboj. En kelkaj lokoj estis farata daŭra, tre efika informado per la regula liverado de Esperanto-revuoj al publikaj bibliotekoj aŭ per havigo al tiuj de Esperanto-literaturo; nur en Bolonjo estis donacitaj 500 verkoj al fama biblioteko de "Archiginnasio"! Inaŭguro de *Zamenhof-stratoj*, publikaj manifestacioj okaze de la *Homaj Rajtoj*, *ĝemeligo de urboj* laŭ la iniciato kaj perado de la Movado, aktiva konkreta kunlaboro kun *ne-esp-aj organizaĵoj* estas aliaj bonaj kaj tre imitindaj ekzemploj de sindona, celtrafa agado, tute speciale montrita en Germanujo kaj Italujo.

Metodo vaste aplikata estas sendado de taŭge formulitaj leteroj al specialaj medioj, tute aparte al personoj laborantoj en la lernejoj kaj al influhavaj personoj de la publika vivo. Tiel agis laborantoj en Aŭstralio, Danlando, Germanujo, Madagaskaro, Norvegujo, Svedujo, kaj certe ankaŭ aliaj. Cirkulero de la madagaskara asocio estis voĉlegita en ĉiuj lernejaj klasoj. En Svedujo oni bone informadis en la internacia kongreso de instruistoj. — Almenaŭ en Aŭstrujo kaj Svedujo oni utiligis la Sciencan Konferencon okazintan paralele kun la U.K. en Kopenhago por sendi informojn al respektive 10.000 kaj 3.000 sciencistoj de la koncernaj landoj. Svedujo vaste utiligis la elstaran Frostavallen-aranĝon por informi la parlamentanojn kaj la landan UNESKO-Komisionon. Elstare bona nacilingva eldono de la landa organo aperis en Pollando.

Informa Fakto de UEA

Siavice la I.F. de UEA klopodis kunordigi kaj harmoniigi la agadon en la diversaj landoj, donante konsilojn, materialojn kaj alispecan helpon. La I.F. de UEA havas regulajn rilatojn al la landaj asocioj, ties informaj faktoj kaj al unuopaj kunlaborantoj. Entute ricevis la publikaĵojn 137 personoj en 38 landoj krom kvindekda membroj de la Ĵurnalista Asocio. Estis aperigitaj 7 pliaj bultenoj de la Internacia Gazetara Servo, po 4 pliaj numeroj de UNESKO-Novaĵoj kaj (Daŭrigo sur sekvanta paĝo)

la angla-franca eldono de la IGS kaj 7 pliaj cirk. leteroj de 22 dense tajpitaj paĝoj plus aldonoj. La I.F. aperigis novan tre uzeblan afiŝon en du formatoj, utilegan por anoncado pri kursoj ktp. La agado en Afriko estis intensigita. Pri tio ĉi vidu detalojn en la baldaŭ aperonta Estrara Raporto.

Konkludo

La rezultoj supre priskribitaj neniel estas plene atingitaj en unu lando, kaj same en la unuopaj landoj la agado okazas ofte tre dise kaj hazarde en la diversaj lokoj. Legante la liniojn, certe pluraj konstatoj, ke tio kaj tio povus okazi ankaŭ en iliaj landoj. Estas ĝenerala sperto, ke daŭrajn rezultojn la informa laboro atingos nur, se ĝi okazas laŭ la gvidaj principoj

de la Principaro de Frostavallen (Jarlibro 1959 p. 186), kiu plene eniris la Duan Bazan Laborplanon de UEA, kaj se ĝi laŭeble okazas paralele kun kaj lige al la aktivado en la instruado kaj en la kultura vivo de la Movado. La eroj de la Principaro kiel ankaŭ de la Laborplano povas ŝajni memkompreneblaj, sed estas fakto, ke ambaŭ ne estas observataj plene kaj ĉie. Se per niaj ĝisnunaj metodoj ni atingis senduban progreson kompare kun 1961 kaj pro tio povas esti tre kontentaj, samtempe la fakto, ke pli kaj pli manifestiĝas praktike la efiko de la Laborplanoj kaj metodaj konsideroj en la diversaj landoj, igas nin optimisme rigardi en la estontecon.

Sven Ziegler,

Estrarano pri Informado

CED

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo Telefono ARNold 9081

ESPERANTO EN UNESKO-KURIERO

Responde al la negativa letero de R. H. J. van Kuyk en ĝia marta eldono, UNESKO-Kuriero jam en majo aperigis kelkajn mallongajn leterojn verkitajn de Esperantistoj, kaj ankaŭ unu malfavoran. Sed en la junia numero aperis preskaŭ komplete, sur unu paĝo kaj triono, la letero, kiun ni publikigis en la maja numero de "Esperanto" (p. 87) en la rubriko de CED. Sur unu paĝo kaj du trionoj estas reproduktitaj kelkaj desegnaĵoj de Botticelli, kiuj ornamas la baldaŭ aperontan Esperantan tradukon de la Dia Komedio. La redaktoro de UNESKO-Kuriero komentas per plej belaj vortoj la aperigon de tiu verko en Esperanto kaj nomas ĝin "grandioza volumo". UNESKO-Kuriero estas nun eldonata en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa, germana, araba, japana kaj itala entute en 500.000 ekzempleroj. Ĝi estas legata de kleraj personoj, inter kiuj tre multaj instruistoj kaj profesoroj. La publikigo de la letero kaj la reproduktaĵoj de Botticelli, kune kun la tre taŭga komento, prezentas unu el la plej belaj atingoj de la lastaj jaroj, kaj estus tre bone, se oni utiligus kiel eble plej vaste tiun ĉi numeron de UNESKO-Kuriero. Unuopa ekzemplero kostas 0,50 gld. (2 stelojn), kaj oni povas mendi pli grandajn kvantojn aŭ de la Sekretariato de UNESKO en Parizo, aŭ, multe pli simple, ĉe la distribuantoj de la UNESKO-publikaĵoj praktike en ĉiuj landoj de la mondo.

GRAVA ANGLALINGVA DOKUMENTO

La du raportoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna al la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco (Kopenhago, 1962), kiuj

jam pli frue aperis en Esperanto en multobligita formo kiel dokumentoj A/II/1 kaj A/II/2 de CED, estas ĵus eldonitaj sub unu kovrilo kiel presita 24-paĝa broŝuro en la angla lingvo. Ekstere la broŝuro prezentiĝas tute konforma al la antaŭaj dokumentoj eldonitaj en la angla kaj franca, nur kompreneble multe pli impona. La ĝenerala intereso precipe de la unua dokumento: "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj", kaj ĝia tre vasta uzebleco por informaj celoj en anglalingvaj medioj, motivis konsiderinde pli grandan eldonkvanton ol kutime.

"La lingva problemo en la internaciaj rilatoj" pritraktas ĉefe la internaciajn rilatojn inter ŝtatoj, registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. Kun abunda dokumenta informo, ciferoj kaj citaĵoj, ĝi prezentas la historion, la evoluon, la politikon, ekonomion kaj psikologion de la lingva problemo en tiu kadro. La argumentojn plifortigas tri plenaj paĝoj da fotoj, inter kiuj ankaŭ serio, kiu prezentas la malplezuron de Eisenhower, kiam li en internacia konferenco ne sukcesis aŭdi la interpretaĵon. Kiel rekta informilo sur alta scienca nivelo, kaj ankaŭ kiel bazo por pli koncizaj artikoloj en seriozaj anglalingvaj periodaĵoj, la dokumento meritas tre vastan utiligon.

La dua dokumento: "Kelkaj aspektoj de la lingva problemo en Internacia Publika Juro kaj Kompara Juro" celas pli fakan legantaron, ĉe kiu ĝia efiko devus esti same granda. La broŝuron kompletigas plena bibliografio, kaj tri sekcioj en kiuj estas ilustrita la taŭgeco de la Internacia Lingvo por redonado de nacilingvaj juraj esprimoj. Ĝi estas havebla ĉe la Centra Oficejo de UEA kontraŭ po 1,— gld. por ĉiu ekzemplero.

Denseco de la membraro. En la tabelo aperinta sur p. 112 (junio) ni erare indikis, ke la loĝantaro de Aŭstralio estas nur 3 milionoj. La ĝusta cifero estas 10,5 milionoj, pro kio Aŭstralio do okupu la 18-an pozicion, post Britujo.

Novaj Libroj

Cion ricevitan ni mencias. Verkojn por recenzo ni elektas inter la duope ricevitaĵoj. Neneŭtralajn eldonaĵojn ni senpartie resumas. *) ricevebla ĉe U.E.A.

ORIENTO-OKCIDENTO N-RO 3: LA STARTOPUNKTO DE SARTRE

La Naŭzo, romano de Jean-Paul SARTRE, elfrancisgis Roger BERNARD; eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1963. Serio Oriento-Okcidento n-ro 3. 212 p. 21 × 15 cm., kun portreto de la aŭtoro. Bindita; prezo:

La Naŭzo estas eldonita de librojo Gallimard en majo 1938. Tuj ĝi vekis fortan emocion kaj admiron. Kvankam ĝi ne akiris la Literaturan Premion en la jarfino verŝajne pro tio ke ĝia troa originaleco ne estis akceptita de protektantoj de "ortodoksa" romano, tamen hodiaŭ oni rigardas ĝin grava verko kiu markas la startopunkton de ĉiuj literaturaj kaj filozofiaj verkoj de J-P Sartre kaj unu el la dekdu majstraj verkoj en la plifrua duono de la 20-a jarcento. La verko ne celas amuzi la legantojn per rozkolora romano aŭ per sanga konflikto inter viroj kaj virinoj, sed provas prezenti en formo de taglibro fundamentajn problemojn de filozofio kaj literaturo, kiujn la aŭtoro kovis dum longa tempo. Roquentin, la heroo de la romano, skribas en la taglibro kiel li vekiĝas je la ekzistadisma konscio, kaj ekscii la subtilan ŝanĝigon de sia konscio estas por li la sola vivpravigo. Li penas fizike kapti la ŝanĝigon de sia sento kaj impresoj pri objektoj kaj aliaj homoj kaj provas esprimi tion. Li ne faras la pensadon nur en la kapo nek muntas teorion manipulant vortojn kiel faras ordinariaj filozofoj, sed serĉadas la signifon de ekzisto per la trasperto de homa vid- aŭd- kaj tuŝsento pri aĵoj, kaj en la komenco tiu aĵo estas nur simpla ŝtoneto: "Pasintan sabaton, infanoj faris resaltĵetojn kaj mi volis ĵeti, kiel ili, ŝtoneton en la maron. Je tiu momento, mi haltis, mi lasis fali la ŝtoneton kaj mi foriris." Kaj plue prezentiĝas tuŝsento de pipo, de forko kaj de pordklinko: "mi estis enironta en mian ĉambron, mi subite haltis, ĉar mi sentis en miaj manoj malvarman objekton, kiu per ia speco de per-

soneco tiris mian atenton. Mi malfermis mia manon, mi rigardis; mi tute simple, tenis la klinkon de la pordo." Estas karakterize ke tiuj okazaĵoj havas kiel la centron de pripensado aĵon ne indan por mencii en nia ĉiutaga vivo. Tiaj aĵoj ĉiam hazarde troveblaj ekzistas arbitre ekster ni kaj tute certe estas ke ni ne estas bezonataj por ilia ekzisto. Kiam Roquentin rigardas sian ekziston mem de aĵoj kaj rimarkis pri la arbitreco, venas al li la naŭzo.

Roquentin ne estas frenezulo, sed klerulo tro klarvida kaj racie pensema. La rendevuo kun la iama amatino Anny ne donis al li faciligon de animo sed servis al li nur por pli klare scii pri la homa soleco kaj la absurdeco de ekzistado. Nun ni povas kompreni, ke por konscii pri la absurdeco de ekzistado kaj pri la kondiĉo kiu fundamentas la homan ekziston la solulo bezonis ekziston de aliuloj precipe tiun de hipokrituloj, stranga aŭtodidakto, kaj burĝoj, kiuj tute ne scias nek volas scii pri la signifado de sia ekzisto. Kaj ni legas ironie humuran priskribon pri portretoj en muzeo. Li mokas ilin portretoj, ĉar ilia ekzisto kaj konscio pri ilia ekzisto estas nepre necesaj, en la komenco kaj ankaŭ ĉiam, por la ekzistadismo. Ĝi postulas, ke oni rigardu per klarvida racio homon kaj malkaŝu ke ĝi estas fundamente malperfekta, malbela, malvirta. Kaj en la fino de la romano Roquentin, aŭdante malnovmodan ĵazkanton, trovas elirvojon ĉe arto kaj decidas verki romanon. Oni povus kredi ke tiu romano estas *La Naŭzo* mem.

Tia provo meti filozofian tezon en literatura verko estas farita de aliaj literaturistoj, sed ili ne sukcesis. En la *Naŭzo* la komplika homa konscio estas traktata per tre klarvida racio kaj dank' al tio legantoj povas trapaŝi la konscihaoson kune kun Roquentin kaj ĉiam kun agrabla sento kaŭzita de perfekta koncepto kaj de freŝaj impresoj de la realisma priskribo. Mi volus emfazi ke la verko atin-

gis altan poezian nivelon, kion A. Gide kaj aliaj revis kaj strebis atingi. Nun ni legu el la Noto de Tradukinto, kiu ĝuste kaj lakone resumas: "J-P. Sartre, sub la preteksto liveri la intiman taglibron de Antoine Roquentin, — fakte priskribis kun realismo inda al tiu de Maupassant, la loĝantojn de Bouville, vere Le Havre, kie Sartre estis profesoro dum du jaroj —, kaj aliflanke dramon, kiun oni povus kredi kaŭzita de la kontemplado al la nenieco, kiel premeĝiteco de estulo submetita al la disruliĝo de senlima ekzistado kaj mem nekapabla konkeri en ĝi sian liberecon."

La traduko estas facile legebla dank'al la fluanta lingvo de s-ro Roger Bernard. La bela priskribo donas al la scenoj tiel freŝan vivecon ke la serioza filozofia tezo kuŝanta malantaŭ ili ne malhelpas la ĝuadon. La internacia lingvo denove pruviĝis kiel tre taŭga ilo por la reciproka aprecado de orienta kaj okcidenta kulturoj.

Ter Isiguro (Tokio)

Dana Antologio, eld. Centra Dana Esperantista Ligo, 1961. 260 p., 23 × 16 cm., desegne ilustrita. Prezo: bind. 11,— gld. (44 st.); broŝ. 8,50 (34 st.)*

Antologioj estas vojmontriloj kaj en tiu senco edukiloj. Prave ni citas ilin kiel riĉaĵojn de la Esperanta literaturo, ĉar ilia valoro por la kulturo de la Internacia Homo estas alta. En si mem la tradukado de mondliteraturaj ĉefverkoj estas grava, kaj ofte ĝi pli imponas, sed por plena kompreno de fremdaj literaturaĵoj absolute necesas ankaŭ havi, paralele, enkadrigajn kaj kritikajn studojn. Antologion oni povas redakti laŭ plej diversaj kriterioj kaj kun tiu aŭ alia limigo de la elekto; tial la varieco de la antologioj en Esperanto — de la sole proza Pola Antologio de 1906 ĝis la Ĉina Antologio, kiu ĉerpis el unu sola jardeko — neniel estas malvirto, kondiĉe ke ĉiu volumo kun klareco kaj kompetento traktu la terenon, kiun trakti ĝi pretendas, kaj per tio veku la literaturan apetiton por pli profunda konatiĝo.

La Dana celas veki vere vastan legemon: ĝi proponas en 260 dense presitaj paĝoj la danajn poezion, dramon, fikcion kaj filozofion de la 17-a jarcento ĝis la nuna. Se tiu intenco ne plensukcese realiĝis, estas do pro tio, ke la kompilintoj iom tro ambicie plenigis la paĝojn, per tio oferante al la kvanto la oportunecon kaj belecon de la aranĝo. (Eĉ Andersen devis humile klini la kapon por ekprezentiĝi ĉe la piedoj de alia aŭtoro).

Aliflanke, se la prezento ne estas ĉiam ideale klara, ni rajtas supozi, ke la enhavo estas maksimume kompleta: ke neniu vere grava verkinto estas forgesita. Ni trovas tie nomojn, kiujn ni jam ekkonis en "Norda Prismo", aŭ pere de libroformaj tradukoj en Esperanto — nomoj, kiel tiuj de Andersen, de Blicher, de Hertz, aŭ de Johannes V. Jensen, — kaj subite ni nin sentas arkeologoj, kiuj fine sukcesas kompreni, por kio servis iu mistera trovitaĵo kaj al kiu epoko ĝi apartenas. Kaj nia riĉiĝo estas dufaca: ni kapablas enlokigi la fragmentojn, kiujn ni jam konas, en la strukturon de la literatura evoluo, kaj samtempe la Antologio mem per tio ricevas ekstran dimension kompletigan. Tute alia afero estas la demando, ĉu tiu ĉi Antologio prezentas ekvilibran kaj objektivan koncepton pri la dana literaturo. Tio ne estas nur problemo de ĝusta elekto, kvankam ankaŭ tio ja ne estas facila tasko; sed temas pri la rekrea rolo de la traduka arto. Ĉiu tradukisto bone scias, ke sukcesa traduko povas brili la plej ordinariajn ŝtonojn, kaj ke des pli facile povas mallerta traduko senvalorigi eĉ ĉefverkan juvelon. Oni rajtas demandi al si, ĝis kiu grado tiu aŭ alia ero de la Dana Antologio plezurigas nin per sia propra merito, kaj ĝis kiu grado tio dependas de la individuaj tradukoj? Eble ne hazarde estas, ke preskaŭ ĉio, kio favore min impresis dum legado, estas proza, ĉar mi sentas la nivelon de la poeziaj tradukoj nete malpli alta. Al tiu impresio foje kontribuas ekzemple la ĝermana akcentado:

*"Rigardas mi kampojn lumantajn
laŭlonge de helblua fjord'..."*

Tamen povas esti, ke la kampara, naturama, simplesprima, ofte religiema poezio de la dana popolo en si mem ne akordiĝas kun la modernaj poeziaj manieroj ĉe aliaj eŭropaj nacioj. Kompreneble, ankaŭ tiun sian karakteron ili scias defendi:

*"Kaj lingvoj pli noblaj,
superbaj sen lim'
laŭdire kelkloke sonoras.
Sed danoj, en lingvo de deca
esprim',
la alton kaj belon honoras.
Kaj pli ni moligas per
milda frazer',
ol pistas aliaj per frazoj el fer'."*
(Grundtvig)

Tiun principon almenaŭ unu leganto, nome la subskribinto, trovas pli prave aplikita en la prozaj elektaĵoj. Rimarkinda ĉe Blicher, ekzemple, estas lia melankolie milda kaj pacema rakonta stilo,

per kiu iel eĉ pli reliefigas la teruraj okazaĵoj, pri kiuj li verkas. Simila stilo tre taŭge impresas en priskribo de la dana kamparana vivo: el infana vidpunkto en "La krisphara Frits" de Møller, en la simpatia satiro de Gjellerup (kies emo al Budhismo bone akordiĝas kun tia stilo), aŭ ĉe la penetra psikologio de Skjoldborg. Sed mi longe memoros ankaŭ la viglan humuron de Jens Baggesen, la maltrankvilan realismon de Knudsen, la intensan priskribon de "Fiŝista Nesto" de Pontoppidan, kaj, memkompreneble, la preskaŭ nedifinblan majstrecon de Andersen, kiu ĉi tie reprezentigas per du antaŭe en Esperanto ne aperintaj noveloj. Estas neeble, finlegi la Antologion sen nova deziro, pli longe kaj pli intime konatiĝi kun multaj danaj aŭtoroj tie prezentitaj.

V. Sadler

Lingvaj Respondoj de Zamenhof, 6-a eldono, aranĝo kaj notoj de Gaston WARINGHIEN. Eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1962. 134 p. 20 × 13 cm. Prezo bind. 7,50 gld. (30 st.), broŝ. 5,75 gld. (23 st.)*

En la komencaj jaroj de la Esperanto-movado ĝiaj lernantoj sin turnadis kun lingvaj demandoj nature al la iniciatinto, kiu afable penadis al ili donadi respondojn. Respondojn de ĝenerala intereso li publikigis en gazetoj por tri periodoj:

- [I] en «La Esperantisto» 1889-1895,
- [II] en «La revuo» 1906-1908,
- [III] en «Oficiala Gazeto Esperantista» 1911-1912.

Tiujn publikigitajn respondojn oni reprenis en broŝuro, pli poste aldona ankaŭ respondojn donitajn en individuaj korespondoj:

[A] «Lingvaj Respondoj aperintaj en La Revuo», t.e. kolekto de [II], 1910, kun 48 pecoj da respondoj,

[A'] Dua eldono de la sama, 1912.

[B] «Lingvaj Respondoj (Nova Serio)», kolekto de [I], 1913. Ĉi tiun eldonon ni tiutempe nomadis ŝerĉe "Nova serio kun pli malnovaj respondoj".

[C] «Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto)», kunigo de [A] kaj [B], 1925, kun 100 pecoj,

[D] La dua korektita eldono de la sama, 1927,

[E] La tria eldono de la sama, 1936, 19 pecoj aldonitaj.

[F] «Lingvaj Respondoj Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto» la prezentata eldono, 1962, kun 181 pecoj.

Ni do vidas, ke dank' al la penoplena kolektado de la editoro (neologismo ne trovebla en lia Grand Dictionnaire) Waringhien,

la nuna eldono [F], t.e. «sesa eldono» estas tre multe ampleksigita (181 pecoj kontraŭ 119 de [E]), kaj pli konvene rearanĝita kun tre valoraj komentoj en piednotoj.

D-ro Zamenhof jam en la komenco deklaris, ke li ne volas esti diktatoro kaj transdonis la plenan mastrecon al la esperantista popolamaso. Tiel en la antaŭparolo al la unua eldono [A] Zamenhof skribas: "Sed kiam mi vidis, ke multaj personoj vidas en miaj Respondoj kvazaŭ ian «oficialan decidon» pri tiu aŭ alia demando, kaj miaj Respondoj sekve povus malhelpi la tute liberan evoluadon de nia lingvo..., mi ĉesis publikigi la Respondojn", ĉar li krom tio timis, ke "en lingvaj demandoj ĉu superflua decido katenas." Jen kial li kvankam rekomencis la respondojn pro la insista peto de la amikoj, li tamen tion faris nur dum tre mallonga tempo! Li ja estis homo de prudento, kaj liaj Respondoj estas antaŭ ĉio praktikaj, neniel katenantaj. Ili estas ĉiuj senerarigaj gvidantoj por ni lernantoj, kaj ni povas el ili eltiri senfine instruojn.

Ekzemple, pri la uzo de la artikolo li konsilas (N-ro 83 B): "Uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj dubaj okazoj tute ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj kutimo de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas." Vere praktika konsilo! (Ankaŭ pri la akuzativo en N-ro 94).

Pri la sintezaj formoj pasivaj «amatas», «amitas» li diras (N-ro 119), ke tiuj formoj "per si mem ne prezentas ian rompon en nia lingvo.... Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon en tia okazo, se «as», «is» k.t.p. signifus «estas», «estis»;... tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas." El tiu ĉi respondi ni povus konjekti, ke ne bone estas diri (ankoraŭ nun kaj almenaŭ en prozo) "Pinoj ĉiam verdas" anstataŭ "Pinoj estas ĉiam verdaj", ĉar la predikata uzo de adjektivo estas simpla mallongigo de ĝia epiteta uzo: "Pinoj estas ĉiam veraĵ arboj" kaj estas ne bone diri "Pinoj ĉiam verdas" same kiel ne bone diri "Pinoj arbas" anstataŭ "Pinoj estas arboj". Kompreneble en poezio ni povas (jam nun) diri, ekzemple: "Matenas, vesperas — kaj tago malaperas" (Proverbaro 636). Ankaŭ nun ni povas diri: "Virtulo verdestas, kiel palmo, staras alte, kiel cedro sur Lebanon" (Psalmaro 92-12). En N-ro 47 A ni ankaŭ trovas: «piesti», «feliĉesti».

La piednotaj komentoj de Wa-

ringhien ankaŭ liveras al ni tre instruajn aludojn. Ekzemple li piednotas por N-ro 9: "... Oni devus atendi R. de Saussure, por ĝuste kompreni, ke la afiksoj de Esperanto estas plejparte iloj *por kunmetado, ne por derivado*." Efektive, kiel klarigite en la antaŭparolo al la Unua Libro (vidu «Fundamenta Krestomatio» pri la solvo de la dua problemo per plena dismembrigo de la ideoj), Esperanto estas "ideale aglutina" lingvo, sur kio de Saussure apogis sian gloran teorion pri Vortostrukturo kaj frakasis la Couturatan derivateorion de Ido. En Esperanto do ne ekzistas "derivado de vortoj", sed nur "kunmetado de vortoj".

Al la Esperanto-lernantoj mi varme konsilas, ke ili nepre profunde studu la instruon verkon «Lingvaj Respondoj» el la plumo de Zamenhof, des pli ĉar ĝin multoble valorigis Waringhien per la kompletigo kaj tre ŝatindaj komentoj.

Kenji Ossaka (Tokio)

Dictionnaire Français-Espéranto, de Roger LEGER kaj André ALBAULT. Eld. Editions Françaises d'Espéranto, Marmande 1961. 672 + 58 p., 16 × 12 cm. Tole bindita. Prezo: 16,00 gld. (64 st).*

Kvankam jam forfluis du jaroj post la apero de tiu ĉi vortaro franca-Esperanta, la malfruigo de nia recenzo neniel implicas subtakson pri ĝia valoro. Ja ne ĉiujare aperas vortaroj pli ol 700-paĝaj, kaj la pozicio de ĉi tiu en nia leksikologio estis tuj agnoskita. Sur la kampo franca-Esperanta la sola konkuranto hodiaŭ aĉetebla estas la "Dictionnaire complet" de Grosjean-Maupin, unuafoje eldonita en 1913. Léger kaj Albault ne nur klopodis produkti vortaron maskimume ĝisdatan, sed ili celis eĉ pli antaŭen, al la tago kiam Esperanto eniros ĉiujn lernejojn. Konforme al tiu celo ili inkluzivis, kaj en la vortaro mem kaj en la suplementoj, aron da terminoj sciencaj kaj teknikaj, kiajn povus bezoni lernejoj. La utileco de tiaj aldonoj kompreneble estas tre granda ankaŭ por ordinara uzanto.

Inter aliaj troviĝas tabelo de geografiaj nomoj, en kiu la aŭtoroj frontis relative objektivaj kaj, laŭ mi, tre inteligente tiun apartan problemon. Ili nome konstatastion, kion multaj ŝajne ne volas konstati: ke ekzistas popoloj kaj ekzistas ŝtatoj, kaj ke tre ofte tiuj ne koincidas. Unuflanke, la popoloj emas formi laŭ etnografaj limoj la ŝtatojn; aliflanke, ŝtatoj jam kreitaj emas krei novajn popolojn. Se tiu duobleco ne spegu-

liĝus en la Esperantaj landnomoj, la lingvo estus per tio malpli riĉa.

Elektinte kelkajn hazardajn paĝojn por detala trastudo, mi trovis nenion aparte kritikindan; plie, mi sisteme utiligis la vortaron por Esperantigi parton de ĝia franc-lingva enkonduko, kaj trovis nenion videblan mankon. Komparu kun la angla-Esperanta vortaro de Fulcher kaj Long tamen instigas min demandi, ĉu valoris aldoni post multaj unusencaj francaj vortoj la fakon, al kiu ili apartenas. En la angla-Esperanta, ekzemple, oni trovas: *lion*, leono, sed en la franca-Esperanta: *lion* (zoo), leono, ktp.

La formato estas sufiĉe poŝa, kion ebligis tre maldika papero. Tiel oni povis per malplia fizika amplekso enpresi preskaŭ duoble tiom da eroj, kiom havas Fulcher kaj Long. Al franclingvanoj apenaŭ necesas rekomendi la verkon: ili sendube jam aĉetis ĝin. Al ĉiuj studentoj de la franca lingvo, tamen, ĝi povas doni same amikan helpon, kaj al ili do mi dediĉu apartan rekomendon.

V. Sadler

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Gray la Jolie bonvenigas vin! eld. Syndicat d'initiative, Gray (Haute-Saône), Francujo. Il. turisma prospekto franclingva kun aldonita folio en Esperanto.

Senelirejo de NGUYEN Kong Hoan, trad. Esperanto-Klubo Hanojo, eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1963. 278 p. 19 × 13 cm. Prezo: 3,— gld. (12,— st.) Romano.

Esperanta komerca korespondado: leteroj, frazeologio, kontraktoj, de Georgo PAPAKIS. Eld. la aŭtoro, Athine, 1963. 191 p. ofsetita, 19 × 14 cm. Prezo 5,50 gld. (22 st.)

Kiel akvo de l' rivero, romano de Raymond SCHWARTZ. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 488 p. 22 × 16 cm. Prezoj: broŝ. 11,40 gld. (45,6 st.), tolbind. 14,40 gld. (57,6 st.) Belliteratura serio n-ro 19/20.

Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, de Marjorie BOULTON. Eld. Stafeto, La Laguna, 1962. 268 p. + 26 bildopaĝoj, 22 × 16 cm. Prezoj: broŝ. 11,40 gld. (45,6 st.), tolbind. 14,40 gld. (57,6 st.) Serio Movado n-ro 3.

Imperativoj de la vivo, de Huberto Rohden. Eld. Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1963. 156 p. 19 × 14 cm. Religia-filozofia verko.

Vår väg — med bibel mot babel (mia vojo — kun biblio kontraŭ babel), eld. Kristliga Esperantoförbundet, Östansjö, 1963. 12 p. 15 × 10 cm. Sveda informilo.

Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu por oponi nian komunan malamikon, el Renmin Ribao, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 25 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,35 gld.*

Sub tiu ĉi titolo aperis en "Renmin Ribao" de 15-12-1962 ĉefartikolo, prezentante la starpunkton de la Ĉina Komunista Partio rilate al diversaj politikaj problemoj. Estas proponite, ke la Komunistaj kaj Laboristaj Partioj okazigu kunvenon por solvi la malakordojn en la internacia komunisma movado kaj por fortigi la unuiĝon.

Ni unuiĝu sur la bazo de la Moskva Deklaracio kaj Moskva Deklaro, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 36 p. 18,5 × 13 cm. Prezo: 1 stelo, 0,25 gld.*

Jen alia ĉefartikolo en "Renmin Ribao" pri la unuiĝo de la internacia komunisma movado, endanĝerigita de la incidento dum la Kongreso de la Socialista Unuigita Partio de Germanujo kaj la publikaj atakoj kontraŭ frataj partioj. La opinio estas, ke nur la Moskva Deklaracio kaj Moskva Deklaro povas protekti tiun unuiĝon.

KHO Khwat Liat (Londono)

Miskolc-Tapolca, eld. Idegengalmi Hivatal, Miskolc, Hungarujo. Kolora il. prospekto turisma en germana lingvo kaj Esperanto.

Észak-Magyar-Ország, eld. Idegengalmi Hivatal, Miskolc, Hungarujo. 60 p. 14 × 20 cm. Foto-libro turisma en ses lingvoj inkl. Esperanton. Prezo 6 rpk.

The Life of Zamenhof, de Edmond PRIVAT, angligis Ralph ELIOTT. Eld. Esperanto Press, Oakville, 1963. Tria, pli ampleksa eldono. 157 p. 16 × 10 cm. Multaj fotoj. Prezo: 4,50 gld. (18 st.).

Norsk-Esperanto Ordbok, (norvega-Esperanta vortaro), de Ragnvald RIAN kaj Erling Anker HAUGEN. Eld. Esperantoforlaget A/S Oslo 1963. 374 p. 19 × 13 cm. bindita.

Refoje pri la malakordoj inter k-do Togliatti kaj ni. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 190 p. 18,5 × 13 cm. Prezo: 1 gld. (4 st.).

Noveloj de Lusin. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 464 p. 21 × 13 cm., bindita. Kun portreto de la aŭtoro kaj kun multaj ilustraĵoj. Prezo: 6,75 gld. (27 st.).

Esperanto, Internacia Lingvo por Skoltoj. Eld. Eŭrosel, Nederlando 1962. Partoj 4 ĝis 6. Entute 52 p. 16 × 21 cm., multobligita. Prezo de serio de 6 kajeroj, inkluzive nacilingvan ŝlosilon: 2,— gld. (8 st.).

Fervojistoj

● Ĉe la 15-a Kongreso de IFEF en Stoke-on-Trent (11-17.5.63) festparolis Prof. D-ro Ivo Lapenna, salutante nome de UEA kaj akcentante la gravecon de la fakaj organizaĵoj por praktika utiligo de Esperanto.

Hortikulturo

● La Ŝtata Hortikultura Eksperimentejo de Svedujo, kiu fondiĝis antaŭ 25 jaroj, kaj kiu enkondukis Esperanton kiel resuman lingvon por siaj raportoj ekde 1953, frontas reorganizon. Fakuloj skribu al la Eksperimentejo, ĉe Alnarp, Svedujo, por certigi, ke la uzado de Esperanto pludaŭros.

Instruistoj

● Fininte enketon ĉe siaj landaj filioj pri la instruado de Esperanto en lernejoj, la neesperantista asocio IFTA konkludis, ke la ĝenerala sinteno ne estas tre favora, sed instigis, ke la Esperantistaj instruistoj "Daŭre memorigu la instruistojn pri unu el la plej gravaj problemoj de la nuntempa mondo".

Literaturo

● La romano de Julio Baghy "Printempo en la aŭtuno" (1931) aperis ĉe Editions Regain, Monako, en franclingva traduko de Irène Marsy-Dancausse.

● La tria eldono de "Monda Kulturo" montras, ke ĝis hodiaŭ aperis minimume 37 romanoj (de pli ol 100 paĝoj) verkitaj originale en la Internacia Lingvo de 19 aŭtoroj de 10 nacioj.

Radio

● Radio Luxemburg dufoje parolis pri la utileco de la Internacia Lingvo, citante la adreson de U.F.E.

Religio

● Por festi la 60-jaran ekziston de sia revuo "Espero Katolika" IKUE eldonos serion de broŝuroj sub la titolo "Kristana Kulturo". Inter la unuaj aperontaj estas la encikliko "Pacem in terris" de Papo Johano XXIII.

Turismo

● S-ro A. Masuhr (Germanujo) lastatempe vojaĝis pli ol 20.000 kilometrojn tra Svisujo, Italujo, Grekujo, Egiptujo, Libano, Sirio, Jordano, Irako, Irano, Turkujo, Jugoslavio kaj Aŭstrujo, utiligante ĉie la delegitan reton de UEA.

● Du universitataj urboj — Uppsala kaj Lund — eldonis novajn turistajn broŝurojn en Esperanto. Senkoste riceveblaj. Skribu en Esp. al Turisttrafika Societo de Upsala, UPPSALA, Svedujo, kaj al Turista Asocio de Lund, LUND, Svedujo.

Argentino

● Argentina Esperanto-Ligo decidis fondi informan fakon, kaj reeldoni la haltintan organon "Argentina Esperantisto".

Aŭstrujo

● La plej altan ordenon de la Aŭstra Unuiĝo de Inĝenieroj kaj Arkitektoj ricevis D-ro Eugen Wüster, konata terminologo en Esperanto kaj naciaj lingvoj.

● La Laborista Ĉambro de Vieno asignis al la Aŭstria Esperantista Federacio subvencion de 3000 aŭstraj ŝilingoj (1500 st.).

Cejlono

● La ĉefa ĵurnalo plifortigis sian atakon kontraŭ la universitataj profesoroj, kiuj ankoraŭ insistas instrui natur-sciencojn per la angla lingvo anstataŭ la sinhala aŭ tamila.

Danlando

● Laŭ la modelo de la sveda kaj norvega informaj fakoj, ankaŭ CDEL komencos eldoni nacilingvan informan bultenon "Esperanto-Nyt".

Franco



● La 27-an aprilo reprezentantoj de UEA kaj UFE solene deponis memorigan tabulon sur la tombon de Generalo Bastien, honora prezidinto de UEA (foto).

Hindujo


● En nova bengallingva enciklopedio de la Bengala Akademio de Literaturo aperos artikoloj pri Esperanto kaj pri Zamenhof.

Israelo

● Esperanto-Ligo en Israelo decidis fondi Kooperativan Eldonejon. La unua planata eldonaĵo estas "Hebrea Antologio", tradukita kaj preparita de J. Kohen-Cedek.

Japanujo

● En Kioto, Osaka kaj Tokio prelegis la prezidanto de la Nov-Zelanda Asocio, Prof. C. J. Adcock, survoje al sia hejmlando.



Japanujo

● Okaze de sia 70-jara jubileo, la Oomoto-organizaĵo konstruigis novan domon ĉe Kameoka kun gastejo, oficejoj, kursejoj k.s. Oni bonvenigas vizitantojn. (La foto montras la konferencojn).

Malio

● En la ĉefurbo Bamako Ing. M. Savir el Israelo disdonis diplomojn al 20 anoj de dua Ĉe-metoda kurso. La lernantoj ricevis preskaŭ 200 leterojn rezulte de anoncetoj.

Sovetunio

● En la Universitato de Moskvo F-ino Vera Zlotnikova preparos kun aprobo de la universitataj instancoj disertacion pri "Romidaj elementoj en la Internacia Lingvo", sub la gvido de Prof. E. Bokarev.

● Ĉe CKD de Medicinistoj en Moskvo estas organizita Esperanta biblioteko je la nomo de S.V. Savičev (1890-1960), enhavanta jam ĉ. 900 volumojn.

Svedujo

● La plej grandan premion de la Sveda Literatura, Historia kaj Antikvaĵa Akademio, la premion Rettig, ricevis Honora Patrono de UEA, Prof. Björn Collinder, pro sia monumenta verko pri la uralaj lingvoj: "A Handbook of the Uralic Languages".

● En Lund okazis dum pentekosto grandsukcesa, modele organizita kongreso en ĉeesto de reprezentanto de la urbo, kiu regalis la kongreson per lunĉo. Multaj gazetaj detale raportis.

LA BUSTO ZAMENHOF

La buston de D-ro Zamenhof, kiu nun ornamas la Hamburgan Ĉambron de la Centra Oficejo de UEA, donacis ne S-ro Felix Epstein (kiel ni raportis sur p. 83), sed la Hamburga Esperanto-Societo, laŭ iniciato de S-ro Epstein. La Asocio direktas plej varman dankon al la Hamburga grupo pro tiu grandanima ago.



● La temoj de la diskutaj grupoj estis fiksitaj jene:

- 1) Ĉu kontraŭmilitaj kampanjoj vere efikas?
- 2) Grandaj kaj malgrandaj popoloj.
- 3) Kien iras Afriko?

● S-ro Lic Tibor Sekelj ĵus konfirmis sian pretecon prelegi dum la kongreso pri siaj *Impresoj el Afriko*, kolektitaj dum unujara vojaĝo tra diversaj landoj de la orienta parto de Afriko kun aparta konsidero al la problemoj de la junularo en tiuj landoj.

● Antaŭ ol forveturi de via hejmloko ne forgesu kunpreni:

- vian kongresan karton,
- muzikinstrumentojn (se vi ilin povas funkciigi),
- bankostumon, kaj
- vian bonhumoron.

● **Kiel veturi?**

Ekzistas por la kongresanoj la jenaj eblecoj atingi la kongresurbon per vagonaro:

Tra Jugoslavio

	alv.	forv.	alv.	forv.
Warszawa		7,23		
Budapest		0,05		
München		15,58		
Trieste		20,20		
Zagreb		3,35		
Beograd		9,29		
Sofia	18,36	—		
Sofia	—	23,10	—	6,27
Mezdra	0,55	1,05	9,02	9,10
Vraca	1,34		9,48	

Do eblas post alveno en Sofio tuj veturi per rapida vagonaro al Vraca kaj alveni tie post la meznokto aŭ evtl. tranokti en Sofio (la KK klopodas aranĝi la tranokton en studentaj loĝejoj — la Komuna loĝejo de la 48-a UK) kaj veturi al Vraca matene per pasaĝera vagonaro.

Tra Rumanio

	alv.	forv.	alv.	forv.
Bukuresti Nord		19,21		
Ruse	22,30	23,10		
G. Orjahovica	1,16	1,28		
Mezdra	4,59	—		
Mezdra	—	6,41	—	9,10
Vraca	7,08	—	9,48	

En la vagonaroj, de ni rekomenditaj (Sofio-Vraca kaj Ruse-Vraca) nokte je la 25.V kaj Sofio-Vraca matene je lia 26.V) estos rezervitaj specialaj vagonoj por la kongresanoj.

Ni rekomendas eviti la vagonaron Beograd — forv. 15,42 — Sofio — alv. 23,58 kaj ankaŭ atentigas, ke la rapida vagonaro "Danubius express" (Moskvo-Bukureŝto-Ruse-Sofio) Ruse — forv. 23,10 ne haltas en Mezdra, do jam en G. Orjahovica oni devas ŝanĝi. Ĉiokaze tiu vagonaro same ne estas rekomendinda.

● Post via alveno en Vraca bonvolu

- aperi en la kongresejo por ricevo de la dokumentoj
- anonci vian eventualan parton



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT,
Jugoslavio.

SEKCIO FONDITA ANKAŬ EN AŬSTRUJO

Dum la Jarkonferenco de la Aŭstria Esperanto-Federacio okazinta de la 3-a ĝis la 6-a de majo en Steyr fondiĝis Aŭstria Esperanto-Junularo, kiu tuj decidis aliĝi al TEJO. La fondiĝon partoprenis kelkaj membroj de la Viena junulara grupo, de la junulara laborista grupo el Linz kaj unuopuloj el kelkaj aliaj lokoj. Sed la Viena kaj la Linza grupoj prezentas la kernon de la novfondita sekcio. Ili ambaŭ havas po 20-30 membroj kaj estas aktivaj. Ekzistas realaj eblecoj, ke fondiĝos grupoj ankoraŭ en du aŭ tri aliaj lokoj. Ĉefa merito por fondiĝo de la nova landa sekcio apartenas al nia eksa Estrarano kaj Redaktoro de "La Juna Vivo" Heinrich Reiter.

AEJ aperigados konstantan junularan parton en la Aŭstria Esperanto-Revuo.

La 6-an de Majo la gvidantoj de la Viena grupo partoprenis kunvidon, al kiu ilin invitis "Domo de junularo". Tie ili preparolis reciproke kunlaboron kun reprezentantoj de grandaj junularaj organizaĵoj.

Dum la fondkunveno okazis Oratora Konkurso, kiun partoprenis internacia trio: Helga Vokal el Vieno, Roman Dobrzynski el Polujo kaj Svobodan Zlatnar el Jugoslavio. La kunveno kore akceptis la konkurson kaj ĝi espreble fariĝos tradicia. La Viena grupo prezentis kulturan programon je kontentiga nivelo. Eble

prenon en la belartaj programoj, en la oratora konkurso, en la sportaj konkursoj (kun klara indiko de la disciplinoj) kaj en la turniro de tablotenis.

Statistiko. Ĝis la 20.V.1963 aliĝis 329 pers. el 17 landoj. Aŭstrujo 3, Britujo 10, Bulgarujo 142, Ĉeĥoslovakio I, Danlando 2, Francujo 14, Germanujo/GDR 43, Germanujo/GFR 8, Hungarujo 3, Italujo 3, Japanujo 2, Jugoslavio 2, Nederlando 4, Norvegujo 1, Pollando 84, Svedujo 5, Usono I.

kelkaj membroj de tiu grupo partoprenos la programon ankaŭ en Vraca. Ĉiokaze ni ĝojus vidi niajn novajn amikojn en nia internacia rondo, kiu kolektiĝos dum la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso.

